

Ekspozicio pri Edmond Privat en la Biblioteko de la Urbo Neuchâtel
okaze de la dekjara datreveno de lia morto, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée Gacond, SRI 476, 1972.11.22 & 25

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni prezentis al vi ekspozicion, kiun starigis la Universitato kaj la Biblioteko de la Urbo Neuchâtel honore al la dekjara datreveno de la morto de Edmond Privat.

A.- Ni tiam anoncis, ke ni legos al vi kelkajn erojn el la tie ekspoziciitaj leteroj kaj gazet-artikoloj. Ni hodiaŭ citos kelkajn paragrafojn el artikolo, kiun Edmond Privat skribis okaze de jubileo, kiu celebradis lian kunlaboron 25-jaran kun la socialista gazeto *La Sentinelle*. Tiu artikolo aperis je la 9-a de januaro 1945. Ĝi komenciĝas kun dankvortoj :

Cl.- « *Mi rediros al nia gazeto dankeman vivsignon pro la absoluta libero, kiun ĝi ĉiam lasis al mi. Neniam frazo estis mallongigita, neniam artikolo rifuzita, malgraŭ la okazoj, kiam mia opinio malsamis kun tiu de la redaktoro koncerne tiun aŭ tiun ĉi eventon.* »

A.- Fakte Edmond Privat forlasis sian antaŭviditan karieron de ĵurnalisto, por reveni en Svislandon. Lin invitis la redaktoro de la socialista gazeto *La Sentinelle*, advokato Charles Naine. Tiu laborista gvidanto tamen avertis la junan Edmond Privat, ke tiu nova kariero estos malkvieta kaj ne tre enspeziga. Aŭdu :

Cl.- « *Kiam Charles Naine invitis la junan kunlaboranton de la gazeto **Le Temps** forlasi kaj Parizon kaj la antaŭviditan karieron, por « instrui iom da historio kaj geografio al niaj laboristaj legantoj », kiel li tiam diris, li avertis min honeste pri la sur sin altirita risko. Fakte en nia malvasta landeto la intelektulo, kiu kuraĝas skribi en la laborista gazetaro, sin kondamnas al izoliĝo kiel socia elĵetito, al vivo modesta kaj al senĉesa insultado, tiom da aĵoj vigligaj por la morala sano. Tiel oni edukiĝas al pacienco kaj bona humoro.* »

A.- Edmond Privat sciis ridi, kiam li legis la mensogojn de iuj kontraŭuloj. Kaj li sisteme rikoltis iliajn sendaĵojn. Nun oni povus ridigi vastajn publikojn per la sloganoj, kiujn ekzemple la malamikoj de la virina voĉdonrajto diskonigis per propagandiloj. Edmond Privat sciis, ke la justeco ĉiam venkas. Lin tiurilate ege influis Charles Naine. Kiel knabo li foje vizitis tiun laboristan gvidanton, kiu poste fariĝis la redaktoro de la gazeto *La Sentinelle*. Aŭdu :

Cl.- « *15-jaraĝa mi alsupris al la urbo La Chaux-de-Fonds por peti konsilojn al Charles Naine : kian karieron elekti ? – Antaŭ ĉio ne tiun de advokato, min respondis Naine varmege. Vi ne ŝatus mensogi ! Serĉadi la veron, jen tio, kio valoras pli ol ĉio aljn !* »

A.- En la sama aĝo Edmond Privat estis en kontakto kun alia laborista gvidanto, la ĝeneva tipografo kaj anarkiisto Bertoni, kiun li ĉiam admiras, kiel modelon de kuraĝo. Aŭdu :

Cl.- « *Alia laborista gvidanto, kiun mi admiregis pro lia kuraĝo, estis Bertoni, tipografo en Ĝenevo. Restis en mia memoro, ke mi aŭskultis lin, kiam mi estis tre juna. Li tiam diris al siaj kamaradoj : « Estas via kulpo, se okazas militoj. Kial vi ĝisas kanonojn ? Estas via kulpo, se ekzistas malliberejoj. Kial vi konstruas prizonojn ? Ĉion vi povas per rifuzo, sed tiam oni devas kapabli mortmalsati.* » Similan paroladon mi neniam plu aŭdis ĝis la tago, kiam mi

vidis Gandhi forŝiri el la hinda homamaso la timon je morto aŭ je battoj, parolante tiel al ĝi en Bombajo, en malhela kortego je la kvara horo matene la antaŭtagon de sia arestado. Iun tagon mi iris viziti Bertoni. Kion estus dirintaj miaj profesoroj en la lernejo « Collège Calvin », se ili estus tion eksciintaj ? « -Ĉar vi petas al mi konsilon, diris al mi la anarkiiston kun bluaj okuloj, neniam fariĝu politika batalanto, lasu la laboristojn mem lukti por sia kaŭzo kaj kontentiĝu ilin defendi kaj klarigi la justecon al la klaso, en kiu vi naskiĝis, se vi posedas la necesan kuraĝon. Burĝo, kiu fariĝas laborista gvidanto, malhelpas nin, nin mem savi, kaj nutras sin je iluzioj. »

A.- Koncerne al tiuj du kontaktoj kun laboristaj gvidantoj Edmond Privat konkludas :

Cl.- « *Neniu el tiuj respondoj falis en la orelon de surdulo.* »

A.- En letero al amikino, koncerne la viziton al Bertoni, Edmond Privat ankoraŭ skribis :

Cl.- « *Bertoni rekomendis al mi, antaŭ ol fariĝi laboristo, akiri firman intelektan kulturon* »

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !